Renate Klag

Walter Klag

Alfred Heiligenbrunner

Leopold Patek

# SAT.IROJ




## Sesa kajero

Unua eldono Vieno 2018-2020
Eldonejo kaj presejo Klag
ISBN 978 3 901211 86 7

La titolbildo montras
birdon en Roterdamo
kiu ne partumis
la 93-an Universalan Kongreson en Roterdamo.
Se vi scias ties specian nomon
bonvolu informi la eldonejon:
Rudolfinergasse 8/11, 1190 Wien, Aŭstrio
esperanto@chello.at

Por Sat.iroj 7 ni urĝe serĉas kontribuantojn.
Bonvole skribu al la eldonejo.

Renate Klag
Walter Klag
Alfred Heiligenbrunner
Leopold Patek

# SAT.IROJ




## Sesa kajero

**La aŭtoroj**

**estas**




j
j
j

kaj inteligentaj!

**Pli bone**
***honoro***
**ol**
***hororo***

# KONDUKO ENA

Karaj gelegantoj, estimataj normalaj homoj, geesperantistoj kaj geneesperantistoj!

Ĉiutage venas al ni amaso da leteroj rete kaj papere, en kiuj ni estas urĝe petataj baldaŭ eldoni la sesan volumon de Sat.iroj.

**Ni ne povas daŭre turmenti nian legantaron, jen la re-stulto!**

Kiel ĉiam estas rimarkoj, korektoj kaj insultoj bone venaj!

Atendante vian eternan dankon

La aŭtoroj

# HAVO ENA


ALBUMO FINVENKA

LUDOJ VORTAJ

TRA LA MONDO

HO MIA ŜERC'!

Teologia logiko

Komunisma logiko

SOLVOJ

DAMAĜANTAJ HUFOFEROJ

# ALBUMO FINVENKA

MONERO
ACCEPTED HERE

Monero, which is esperanto for 'coin' was the best performing cryptocurrency of 2016.

KION
GROUP

gemeente Tiel

NORDA
STELO

Norda Stelo means “Northern Star” in Esperanto.

STELO Schrumpftechnik
• Schrumpfprodukte
• Isolierschläuche
• Kabelzubehör

SPESMILO CAPITAL

Spesmilo Capital an independent international development and investment company. We support entrepreneurs in their ambition. Spesmilo Capital is mainly active in Spain and the UK.
We are active on various fields:

Investing in projects and enterprises
Providing capital for enterprises with growth potential
Development of industries and projects

We focus particularly on:
Sustainable industries and projects
Retail projects
Hotel and leisure projects
Sustainable, organic and fair-trade production and projects
It is in these fields that Spesmilo Capital has extensive experience and expertise. The main aim of Spesmilo Capital is, as we word it ourselves, having an eye to, and being specialized in, yielding a maximum return from a project.

**Spezialgebiete**
Hotel and leisure projects, Retail projects, Sustainable industries and projects, Sustainable, organic and fair-trade production and projects

| Webseite | Branche | Typ |
| --- | --- | --- |
| http://www.spesmilo.com | Baugewerbe | Aktiengesellschaft |

grandeco
wallfashion group nv


beleco

GOOD DESIGN. THAT'S IT.

...

Beleco
international

...


http://beleco.tradekorea.com
Beleco Co Ltd
Home
Products
Company Information
Notice Board
Cosmetics
make up brushes
BELECO
Beleco Co. Ltd. is a distributor all brands of South Korea cosmetics.
Main products The Faceshop, Nakeupface, Karadium, chosungah22 ,
16brand, Label young, Secret key, etc.
distribution of the products of all Korean brands.


the Meaning of Names .org
Katido

# "Senfine"


Der Traum von der Uhr, die nie stehenbleibt

Zum 20. Firmen-Jubliäum präsentiert Parmigiani Fleurier die Konzeptuhr "Senfine", die die Grenzen der Gangdauer deutlich nach oben verschieben soll

Der Name deutet auf die ehrgeizigen Pläne von Parmigiani Fleurier hin: "Senfine", so heißt die Konzeptuhr der Manufaktur, ist dem Esperanto entlehnt und heißt "ewig".






Rilato, relation en langue esperanto ; langue internationale connectée par les liens qu'elle tisse entre les différentes personne ne pouvant communiquer entre-elles que par ce moyen révolutionnaire ; propose une nouvelle forme de relation entre un animal domestique et son maître.









Ekde 2011 faranto alĥemion de biera kultura.

*Trovis Leopold Patek*






Exklusive Pferdepflege für anspruchsvolle Reiter.

CXEVALO®

steht für exklusive Pferdepflege aus Österreich, inspiriert durch die Kraft natürlicher Kräuter und Pflanzen. Das Wort Cxevalo entstammt der Kunstsprache Esperanto, die Ende des 19. Jhdt. entstanden ist und bedeutet Pferd.

BonGusta
FEEL GOOD FRESH FOOD

PREMIUM COFFEE
BONEGA
100% ORGANIC




Şanlıurfa'da, bugün hizmete giren BONEGA Acenta şirketi coşkuyla açıldı.

Mistéra



# LUDOJ VORTAJ

Do inter honoro kaj hororo estas nur unu litero. Jen triliteraj distancoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| pag | tim | vid | pet |
| pan | ... | ... | ... |
| man | ... | ... | ... |
| mon | mur | mar | dom |

Nun pli malsimplaj liter-anstataŭigoj.
Indiko: vi ie bezonas la kroman literon d.

| | | | |
|---|---|---|---|
| verb | poet | pont | rost |
| ...d | .... | .... | .... |
| .... | .... | ...d | .... |
| .... | ...d | .... | d... |
| .... | .... | .... | .... |
| poŝt | kruĉ | falk | pens |

Solvojn vi trovos en malantaŭa parto de la kajero.




# TRA LA MONDO

## MISTERO KORPA

Dum kongresoj esperantistoj volonte preĝas al la Mistero Senkorpa. Ĵus islandaj speleologoj malkovris, ke ĝi havas parencon, la Misteron Korpan. Vintre ĝi vivas en kaverno en Skotlando. Kiam la gazetoj havas ne multon por raporti, ĝi naĝas kelkajn rondojn en Loĥneso. Ĝis nun ne ekzistas fidinda foto de la Mistero.

Bonŝance la Mistero trasomeras en Aŭstrio. La redakcio fotis ĝin, kiam ĝi sunumis en kompoŝtujo:



## LIBRO VALOREGA

La 1,5-kilograma Plena Ilustrita Vortaro iĝas pli kaj pli valora. Antaŭ kvin jaroj la prezo por rubopapero estis 5 eŭrocendoj por unu kilogramo. Nun estas eĉ 8 cendoj.

## IMPOSTOJ NOVAJ

§ 1: Ekde la unua de januaro la aŭstroj pagas malpli da impostoj. Bedaŭrinde la ŝtato havas grandajn ŝuldojn kaj malplenan monujon. Tial la ministro por financaj aferoj devas enkasigi novajn impostojn.

§ 2: Suna imposto. Kiu havas fenestrojn je la sudaflanko de sia domo, tiu ĝuas multe da lumo kaj ŝparas energion. Tio estas nejusta privilegio. Estonte oni pagas por ĉiu suda fenestro 100 € en la jaro; por ĉio orienta aŭ okcidenta fenestro 50 € en la jaro.

§ 3: Spira imposto. Kiu spiras, tiu produktas akvovaporon kaj karbondioksidon. Sekve la arboj kreskas pli rapide kaj faras ombron. Krome aŭtune la komunumo devas formeti pli da falintaj folioj. Estonte oni pagas por 1000 enspiroj 1 €; por 1000 elspiroj 2 €.
§ 4: La impostoj estas pagendaj ekde la 1a de aprilo.

## INSULTO IMPERTINENTEGA

La aŭstria ministro por Diversaj Aferoj sendis salutmesaĝon al la sekvajara Tutmonda Kongreso de Esperanto. Nur poste emerita historiisto malkovris, ke la prapraprapraavo de tiu ministro insultis Lazar Markoviĉ Zamenhof en la jaro 1899 "ŝrumpinta bervalano". Tuj Universala Esperanto-Ligo sendis akran protestleteron al la aŭstria registaro kaj bruligis la salutleteron.

## MUSFROMAĜO FURORAS EN ĈINIO

Kutime oni faras fromaĝon el bovina, malofte ŝafa, kapra aŭ eĉ azena lakto. Tute nova estas musfromaĝo, kiu produktiĝas en la bieno "Bela Musino" de la familio Ĉanĉendorfa en Stirio. Temporaba estas la melkado, ĉar unu musino donas en unu tago nur 20 kub-milimetrojn da lakto. Tial 100 gramoj da tiu fromaĝo kostas 500 €. Estas evidente, ke nur riĉaj ĉinoj povas tion pagi.

# HO MIA ŜERC'!

## Teologia logiko

Juna pastro la unuan fojon helpas aŭskulti la konfeson. Alvenas juna knabino kaj konfesas: "Mi amoris kvinfoje kun mia amiko".
La pastro ne scias, kion doni kiel pento. Kvankam estas malagrable, li iras al apuda konfesprena seĝo kaj demandas la maljunan pastron: "Kion doni por kvinfoja seksumado?" - "Kvin rozariojn", respondas la maljuna pastro.
La juna revenas al sia konfesejo kaj absolvas la knabinon per kvin rozarioj.
Tuj poste venas alia knabino. "Mi amoris trifoje kun mia amiko", ŝi konfesas.
"Trifoje", li pensas, "tio estas malfacile". Kaj li ne volas demandi jam denove la maljunan pastron. Li do havas ideon.
"Amoru du ceterajn fojojn kun via amiko kaj poste preĝu kvin rozariojn!"

Legita germanlingve ĉe https://books.google.at/books?isbn=3475543699

## Komunisma logiko

Tri arestitoj sidas en malliberejo en komunisma Orienta Germanio (GDR).
Nova gardisto volas scii la kialon de ilia aresto.

1-a arestito: "Mi ĉiam venis 5 minutojn tro frue. Oni kondamnis min pro spionado."
2-a arestito: "Mi ĉiam venis 5 minutojn tro malfrue. Oni kondamnis min pro sabotado."
3-a arestito: "Mi ĉiam venis ĝustatempe. Oni kondamnis min pro posedo de okcidentaj horloĝoj."

# SOLVOJ

de literinterŝanĝaj enigmoj:

| | | | |
|---|---|---|---|
| verb | poet | pont | rost |
| verd | pret | font | rest |
| perd | kret | fond | rent |
| pord | kred | fand | dent |
| port | krud | fald | dens |
| poŝt | kruĉ | falk | pe |

# DAMAĜANTAJ HUFOFEROJ

Unu el la plej elegantaj stratoj en Vieno estas Herrengasse, kie troviĝas kelkaj palacoj de nobeloj. Laŭ plano de la Verdula Partio ĝi transformiĝis al komune uzata zono por piedirantoj, aŭtoj, busoj kaj bicikloj, kie ĉiu devas atenti la alian. Malaperis la tradiciaj trotuaroj, anstataŭe oni metis multekostan pavimon el naturaj ŝtonoj sur la tutan larĝecon kaj longecon de tiu strato. Antaŭ la enirejoj de la magazenoj oni instalis lumtapiŝon el multaj lumdiodaj lampetoj.



Grandan parton de la kostoj transprenis entreprenistoj, kiuj havas magazenojn ambaŭflanke de tiu strato. La tuta alikonstruado kostis 6 milionojn da Eŭroj, la komercistoj pagis 90 %. Rapide kreskis la vendosumo de la magazenoj.

Sed tiu pavimo havas malamikojn: La fiakroj. Temas pri kaleŝoj tirataj de po du ĉevaloj, kies hufoferoj ruinigas eĉ la plej duran graniton. Ekde la 13a de januaro 2017 staras speciala trafikŝildo, kiu malpermesas la enveturon en la nordan parton de tiu strato. Atendantaj fiakroj devas parkigi sin alie sur betonita areo. La kurantajn kostojn por bonteni la stratojn ekde nun pagas la komunumo Vieno, ne la komercistoj.



Eĉ fero de hufo
Konstante frapante
Kaj paŝo post paŝo
Post longa irado
Damaĝas graniton
Sen gloro.



# Internationales Esperanto-Museum

Wien 1., Herrengasse 9
Haltestelle Herrengasse der U3
☏ 0043 1 534 10 730 💻 esperanto@onb.ac.at

Öffnungszeiten: Dienstag bis Sonntag 10 bis 18 h
Donnerstag 10 bis 21 h
**Esperantokurse und Führungen auf Anfrage.**

Im selben Haus befinden sich auch die
**Sammlung für Plansprachen**,
die
**Musikaliensammlung**
und das
**Globenmuseum**


Stulte rigardi povas ĉiu